Tiu feria renkontiĝo, mallonge nomata REF, jam havas 10 jarojn da tradicio. Ĝi okazis ĉi-jare en la ĉarma urbeto Szentgotthárd en Hungario, ĉe la landlimo kun Aŭstrio, de la 6-a ĝis la 14-a de aŭgusto. Tie renkontiĝis familioj, kiuj parolas, kaj uzas Esperanton en hejmo kaj iel per ĝi edukas siajn infanojn. La organizantoj, g-roj Csiszar majstre aranĝis la tuton, ebligante senstreĉan interkonatiĝon inter plenkreskuloj kaj infanoj, kiuj amikiĝis aŭ reamikiĝis uzante Esperanton tute nature.

Estis kvindekda partoprenantoj, gepatroj kaj infanoj, kiuj dum tiuj tagoj kune feris, ludis, kantis, amuziĝis. Lertaj estis la gvidantoj pri kantado, kiuj instruis al ni, gepatroj kaj infanoj, interesajn kaj viglajn kantojn. Al la plej junaj infanoj oni instruis amuzajn kantetojn kun mimikoj. Jen ekzemplo:

La aŭto de la ĉefo havas truon en la rad', (3x)

Ni riparu ĝin per peco de maĉgum!

Poste oni kantas tiun strofon anstataŭigante la vortojn *aŭto, ĉefo, truo, rad', peco de maĉgum!* per mimikoj aŭ onomatopoeoj.

Dum la tuta daŭro estis varma kaj bela vetero, tial plej ofte en la posttagmezoj, ni iris naĝi al la urba naĝejo kun nature varma akvo (28 gradoj) aŭ al proksima lageto. Sed ni ankaŭ ekskursis al apudaj montoj. Dum la distraj vesperoj ni ludis kaj amuziĝis eĉ prezentis skeĉojn en tute agrabla familia etoso. Poste por iuj gepatroj la vesperoj finiĝis en proksima trinkejo por amika babilado, ĉe glaso da biero. Dume la infanoj 10/17-jaraj kun-sidis en la kelo en tute gaja rondo ĝis eĉ fru-matene. Ĉu ili estos la venont-jaraj anoj de TEJO? partoprenantoj de estontaj junularaj aranĝoj?

Sed dum tiu REF ni ankaŭ pridiskutis pli seriozajn temojn, nome la uzon de Esperanto en la familio, ĉu inter la geedzoj, ĉu kun la infanoj. Plej diversaj estis la situacio de la tieaj partoprenantoj. Iuj paroj estis samnaciaj, aliaj du-naciaj, plej ofte loĝantaj en la lando de la edzo. En ĉi-tiu lasta situacio ekestas tri lingvoj, kaj stariĝas la demando, kiun lingvon uzu la gepatroj kun la infanoj. Ofte la patrino parolas sian propran lingvon kun la infanoj, kaj la patro Esperanton, adoptante la principon *unu persono, unu lingvo*. Aliajn spertojn prezentis Jugoslavino edziniĝinta al kanadano, loĝanta en franc-lingva Kanado. Ili ne adoptis la principon *unu persono, unu lingvo*, sed uzas la lingvon laŭ cirkonstancoj. La patrino sola kun siaj infanoj uzas la kroatan, kiam la patro estas hejme Esperanton, kiam estas gasto aŭ parenco *ne-esperantisto*, aŭ eksterdome, la francan. Ĉu pli efika principo por eduki la infanojn en 3 lingvoj? Ĝi ŝajnas ne tiom facile regebla en tia strikteco. Ŝajnis, ke paradokse la samnaciaj familioj sukcesis plej facile eduki siajn infanojn en Esperanto, pro la fakto, ke tiam aldoniĝas nur unu lingvo, al la nacia lingvo, t. e. Esperanto.

Aliaj problemoj por la edukado de la infanoj kaj la uzo de Esperanto en la hejmo, estis havigi al si taŭgan materialon: poemetoj, rakontoj por infanoj, infanaj kantoj kun muziko, infanaj ludoj en Esperanto, hejma vort-provizo ktp. Tion la organizantoj de tiu aranĝo aparte emfazis, tial ni ne nur lernis kantojn, kantetojn, poemetojn sed ni eĉ surloke registris ilin sur kasedon, por ke aliaj gepatroj povu ilin uzi por siaj idoj. Plie estas ankaŭ en preparo Esperanto-terminologio por ĉiu-tagaj hejmaj vortoj. Grava kaj malfacila tasko. Ĝin prizorgas s-ro Corsetti kunlabore kun aliaj gepatroj.

Aparte mi ŝatis la amikan kaj simpatian etoson, kiun la organizantoj, g-roj Csiszar sukcesis krei kun lerto kaj spontaneco. Krome nenia krokodilado interrompis tiun agrablan etoson, grava elemento por konservi la familiajn trajtojn de tiu aranĝo, pri kiu, mi konservos agrablan memoron.

Se vi estas familio uzanta hejme Esperanton, bonvolu tiam indiki vian adreson al s-ro Renato CORSETTI, Colle Rasto, I-00039 ZAGAROLO Italio, kaj iom klarigi al li vian situation pri la uzo de Esperanto en via hejmo. Vi ricevos la *Cirkulaĵon por esperantlingvaj paroj kaj familioj*

Se vi deziras ricevi kopion pri la kasedo registrita en Hungario, bonvolu sendi al mia pĉk: Grossmann 15 13 72V Strasbourg, 20F por la kasedo kaj afranko.

 *
 NI BICIKLUMIS INTERNACIE!

"La 6an de aŭgusto finiĝis la Internacia Junulara Renkontigo, kiu okazis dum unu semajno en RASTATT (FGR) kaj kies temo estis "Naciismo kaj Internaciismo en Eŭropo". La programo de tiu lasta tago konsistis el biciklado al ALSACO. Tiun aferon mi ne rajtas manki kaj frumatene mi atingis Rastatt. De tie trans la Rejno per la framo en Seltz kaj ĝis Betschdorf la trideko da junuloj sekvis Esperanto-flagon, kiu daŭre gaje flugetis unuavice. Tie S-in^o SCHEIDEL atendis kaj invitis nin por pikniko en sia ĝardeno... Vizito de la pot-muzeo, akcepto en la urbdomo postsekvis. Gratulon kaj dankegon al Odette Scheidel!"

 INTERNACIA RENKONTIĜO EN BAZELO *

(Ĉerpita el raporto de Laurence REIBEL)

En tre agrabla etoso ni pasigis la vesperon de la 3a de aŭgusto en restoracio "Glogge" en Bazelo, kie la tiea E^o-grupo organizis renkontiĝon kun gesamideanoj venintaj ŝipe laŭlonge de la Rejno, el Roterdamo, tuj post la Universala Kongreso.

Plej parte ili estis usonanoj, sed ankaŭ kelkaj svedoj, bulgarino, italino kaj eĉ samideano el fora Aŭstralio! Aldoniĝis esperantistoj el najbaraj Germanio (Freiburgo) kaj Francio (Mulhouse), entute proksimume kvardeko da partoprenantoj.

Post interkonatigo kaj iom da babilado S-in^o Döring salutis kaj bonvenigis la ĉeestantaron. Honore al la eksterlandaj gastoj, iu fraŭlino "jodlis" du lokajn kanzonojn kaj alia samideano lumbild-prelegis pri diversaj regionoj de tiu ege pitoreska Svislando.

Iom post la deka, la vizitantoj eksalutis svinginte la manon kaj kantinte "Temas nur pri Ĝis Revido!" Ili verŝajne pasigis lacigan tagon kaj por la morgaŭo, aliaj projektoj estis faritaj... Ni ankoraŭ babilis kun niaj germanaj amikoj (kelkaj el ili ĉeestis nian federacian kongreson en Mulhouse), kiuj siavice invitis por renkontiĝo estontece en Freiburg.

La adiaŭo estis fervorega kaj tiu vespero certe neforgesebla!...

Alexandra MUSSABINI

 *
 INTERESOPLENA JUNULAR-KONGRESO

TEJO kongresis en ZAGREBO. TEJO: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kiu solenis ĉi-jare sian 50an naskigtagevenon!

IJK^o: Internacia Junularo-Kongreso. La gejunuloj ŝatas uzi tian siglon! Ĉirkaŭ 400 homoj partoprenis en Zagrebo, Jugoslavio.

La kongres-loko: parto de la fakaj altlernejoj; tute apude la loĝloko (logdomoj por studentoj). La konstruaĵoj staras en "Nova Zagrebo", en moderna tre denskonstruita kvartalo. Tien alvenis la kongresanoj ofte trajne, kelkaj veturile, kelkaj bicikle. Tiamaniere venis Jorgos kaj aliaj "bemi-anoj" traveturante diversajn landojn. La foto montras grupon da ili en Triesto, kun la vic-urbestro, ĵurnalistoj kaj lokaj amikoj.



Per tramo de Zagreb mem venis multaj.

La unuan vesperon post la interkonatiĝo venis al ni du junaj virinoj kaj demandis nin pri nia devenurbo. Ili loĝas en Z. kaj lernis E^on dum 2 semajnfinoj iom antaŭ la Kongreso!... Kaj ili vere parolis, jes! La celo stimulis ilin: partopreni al internacia renkontiĝo. La uzata ilo helpis: la tiel nomata "Zagreb-Metodo", fama en multaj landoj, kun interparoladoj, memserĉadoj, facila kaj nur utila vortaro.

La principo mem de kongreso ebligas elekti, kion oni volas, tiamaniere ke, fakte ĉiu vivas "sian propran" kongreson. Unuj venis por paroli, renkonti homojn, plenigi la adreskolekton. Aliuj venas por ĉeesti regule la alnivelajn renkontiĝojn pri la ĉef-temo: ĉi-jare pri "Komunikado en la 21a jarcento". Kolokvo okazis dum 3 tagoj, dum kiu prelegis famkonataj esperantistoj pri lingvoj, teknologio, filozofio... ekz.: "Komunikado, tiu tiel homa afero", "La trajnoj de la estonteco", "Ĉu homa, ĉu maŝina lingvo?", ktp...

Aliaj partoprenas al la diversaj kluboj por kunkanti aŭ muzikludi, danci, mem fari simolajn donacetojn, pupteatron, skeĉojn, sporton... La rezulton prezentis la kluboj dum la lasta vespero. Multe venas por la tiom agrabla etoso, libera, "malfermita", varma, juna... Eĉ se kelkaj -kiel mi- eĉ de longe transiris la aĝlimon por aliĝi al TEJO aŭ JEFO (franca grupo)! Sed kore, ĉu aĝo gravas?

Do la programo estis tre alloga; grupoj zorgis pri televido, radio, bulteno. Oni havis eblecon viziti la televidejon kaj evidente la urbon mem, kiun mi tre ŝatas. oni proponis agrablajn kaj ofte amuzajn vesperojn, kies temo estis loka muzikarto kaj viglaj dancoj, pupteatraĵoj, koncertoj -ĉefe "rok"-, teatraĵoj... Mi citu leningradajn aktorojn, kies ludprezentaĵo estis ŝerco pri speco (specio!) de tro "saĝaj" esperantistoj! Ni ofte ĝoje pludancis post la oficiala programo.

Ankaŭ okazis ekskursoj kiel kutime; ĉiuvespere ni atendis malpacience la prezenton de tag-filmado pri la kongresanoj! La skipo de Kruno bone kaptis la eventojn kaj la etoson.

Ni mem -mi kun amiko- povis aldoni program-eron: "Kiamaniere komuniki kun sia propra korpo": ĉeestis interesatoj dum du horoj en salono "Libero" (disponigita al eventualaj petantoj); dum la tuta semajno homoj venis ĝis la dormveturilo por vidi, provi la "malstreĉilon" por spino kaj diskuti kun ni. La amiko ŝatis multe la nekredoblan kaj simplan komunikemon kaj komprenemon.

La lastan tagon oni ĝuis prelegon de korea kuracisto pri akuponkturo. Li parolis esperanto-lingve kaj oni tradukis jugoslaven por la landaj fakistoj invititaj okaze de tiu neantaŭprogramita prelego, kiu finiĝis per debato.

"Ĝis venontjare en Kerkrado"! ofte aŭdiĝis je la fino, kiam oni adiaŭis, emociigitaj kaj feliĉaj!

Lidja BLOCH = Bar-le-Duc

NOVAĴOJ EL NIAJ GERMANAJ SAMIDEANOJ

*

La 25an de aprilo okazis la 3a jarkunveno de la E^o-grupo VILINGO-ŜVENINGO, al kiu apartenas membroj el tri najbaraj distriktoj. En sia jarraporto la prezidanto de la grupo, Josef SCHIFFER (Jozefo Ŝifero) substrekkis, ke 53 personoj vizitis la 23 grupvesperojn. Dum tiuj vesperoj oni intense lernas E^on en du grupoj. La komencantoj estas instruataj de J.S., instruisto de fremdaj lingvoj. Post trastudo de "Esperanto Programita" de Hermano Bermano ili faras ekzamenon, ricevas ateston kaj rajtas plulerni kun la progresantoj, gvidataj de Siegfried SCHEIBE (Sigfrido Sajbo), pensiita instruisto de fremdaj lingvoj.

La vigleco de la grupo montriĝas ankaŭ en la fakto, ke la grupmembroj gajnis 1100 personojn, kiu subskribis la ĉi-tie tradukitan jenan tekston: "Jes, mi taksas E^on bona. Mi deziras, ke la Ministerio pri Edukado serioze ekzameni, ĉu Esperanto povas esti enkondukata en la lernejojn". Tiu granda nombro de E^o-amiko estas la favoraj legantoj de la multaj raporto pri E^o-aktivecoj en la loka gazetaro kaj kelkaj el ili eĉ partumis diversajn arangojn de la E^o-grupo.

 ★
 INTERNACIA SEMAJNO EN ALPOJ

Dum la lastaj jaroj la grupo Montpellier organizis tiun Internacian Semajnon en Sète en la monato septembro. Escepte ĉi-jare, ĝi okazis iom pli norde en Alpoj, kaj iom pli frue, de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto. Tial mi-mem povis partopreni ĝin, kaj ankaŭ pluraj infanoj, kiuj kutime en septembro jam ne ferias. Ĝi okazis en familia ferio-hejmo *Joie de Vivre* en Habère Poche (74). 70-o da partoprenantoj el 6 landoj ĉeestis, sed bedaŭrinde proksimume 30 aliĝoj estis rifuzitaj pro manko de loko, ĉar la tuta domo ne estis luita por la Esperanto-aranĝo. *(Se la organizantoj estus sciintaj tion ili estus rezervintaj la tutan domon.)*

Dum tiu semajno okazis 4 divers-gradaj kursoj pri Esperanto, mi-mem ĉeestis la 4-gradan kurson, kiun lerte kaj sperte gvidis s-ro Daniel Moirand, profesoro pri la rusa lingvo en la universitato de Aix-en-Provence. Tiu kurso estis tre interesa kun simpatia partoprenantaro. Iuj iom prelegis pri kelkaj temoj: Instrui Esperanton al afrikanoj per metodo 4. Radiestezio. La Esperanto-radio-amatoroj. La anabaptistoj rifuzantaj modernismon kaj evoluon, vivantaj nun-tempe en Usono, kaj Kanado.

Dum la posttagmezoj okazis ekskursoj en la Alpoj aŭ al la Lemana lago. Vespere oni ludis, kantis kaj instruis dancadon. Sed plej interesa estis prezentado de diapozitivoj pri la konstruado de la moderna ĉef-urbo Brazilio. Ĉu vi sciis, ke en tiu urbo tute ne ekzistas semaforoj? La stratoj renkontiĝas neniam kruciĝante, sed kuniĝas kiel alir-strato al aŭto-ŝoseo. Alia interesa prezentado de diapozitivoj estis pri Jugoslavio. Plur-nacia kaj plur-lingva lando, *(nocioj apenaŭ kompreneblaj por francoj, por kiuj nacio kaj ŝtato havas preskaŭ la saman signifon)*, kun diversaj specifaj problemoj ligitaj al tiom da minoritatoj ĉu lingvaj, ĉu kulturaj.

A. Grossmann

★★★★ plus rapide... plus efficace ...



NOTRE NOUVEAU COURS D'ESPERANTO PAR CORRESPONDANCE



- ★ un matériel MODERNE
- ★ une technique EPROUVEE
- ★ un réseau d'animateurs COMPETENTS
- ★ un savoir IMMEDIATEMENT opérationnel

C'EST LE COURS "QUATRE ÉTOILES"!

Tous renseignements à l'adresse suivante:

COURS D'ESPERANTO M.J.C. Ph. Desforges
 PAR CORRESPONDANCE 27, Rue de la République
 54000 NANCY

En la unua duono de Aŭgusto 1988 estis publikigitaj en **Le Républicain lorrain** de Metz kaj en **Les Dernières Nouvelles d'Alsace** de Strasburgo du artikoloj tre interesaj por nia propagando, kaj tio estas por ni pripensiga; tro facile ni kredas, ke la ĵurnaloj principe kontraŭas nin; fakte, ili estas nek por Esperanto, nek kontraŭ ĝi: ili volas nur distri sian legantaron kaj, ĉar fremda aŭ nekonata aĵo ŝajnas ridinda al la popolo, estas eterna tento por seninspiraj gazetistoj amuzigi ĝin per mokaĉoj. Sed ni estu konvinkitaj, ke sprito de malpravanto povas efiki nur provizore, tiel longe kiel li ne trovas antaŭ si kompetentulon, kiu lin rebatas. Ĉe la SDN en 1923 Gonzague de Reynolds, estonta admiranto de Hitler, sukcesis ridaĉigi komisionon per supraĵaj kaj kvazaŭ kabaredaj kritikoj kontraŭ Esperanto, kaj malakceptigi favoran rekomendon. Sed, kiam en 1954 iu Blinkenberg volis imiti lin en Montevideo, por ke UEA ne estu agnoskita de UNESCO, ĉeestis la granda Ivo Lapenna; en la tri nuraj minutoj lasitaj al li por defendi Esperanton, nia granda oratoro ne kapablis forigi la malamikan etoson kreitan de Blinkenberg kaj malhelpi nean voĉdonadon de la komisiono; sed dank'al jura subtilaĵo li obtenis, ke revoĉdonu la generala asembleo. Intertempe la delegitoj povis pripensi, kaj la pli honestaj kaj inteligentaj, komparante la seriozan argumentadon de Lapenna kun la bufonaĵoj de Blinkenberg, ekkonsciis, ke ĉi tiu ne nur mokis pri Esperanto sed eĉ pli pri ili mem, kalkulante kun ilia naiveco; ili ŝanĝis sian opinion kaj UEA estis agnoskita.

Tial ni Esperantistoj ne senkuraĝiĝu, se ie aperas kontraŭ-Esperanta skribaĉo: ekzakta kaj klara informo estas ĉiam pli efika, finfine, ol iu kontraŭ-Esperanta atako, kiu nepre baziĝas sur nescio kaj ignoro, kaj tial ne povos lasi spuron en la racia konscio de la legantoj; ni nur klopodu, ke tiuj sinceraj informoj estu regule publikigitaj, kaj tion ni povas efektiviĝi, se ni kuraĝe volas ĝin. Pasintjare, en **Les Dernières Nouvelles d'Alsace** oni trovis absurdan artikolaĉon okaze de la Jubileo; mi protestis al la Ĉefredaktoro sed tute vane: neniam ĉefredaktoro konfesos, ke lia ĵurnalo mensogis; nun mi komprenas, ke la kulpulo estas mi: se mi sendus en julio 1987 interesan kaj altnivelan studon, ĝi aperus, kaj la ĉefredaktoro ne bezonus repreni stultaĵon el Pariza revuaĉo.

Sed kio estas artikolo interesa por la legantoj? Se juĝi laŭ tiuj du, ĝi estas artikolo, kiu substrekas la internaciecon de Esperanto. Informi pri nacia evento ne tuŝas la publikon; sed legu la ĉi-subajn titolojn redaktitajn de la ĵurnalistoj mem(!): **La Kafejo "Ce la Lumo" en orbiton por ĉiuj Esperantistoj de la Tero kaj Strasburga etapo por usonaj Esperantistoj.** Se s-ro de ZILAH petus **Le Républicain lorrain**, ke ĝi publikigu artikolon pri la Metz-a Esperanto-Konferenco, oni enmetus pro ĝentilo dulinian sciigon; la trafa ideo estis tiu solena alkroĉo de iu bildo de Raymond Schwartz en la kafejo **A la Lune** por sciigi al la Metz-anoj, ke dank'al lia romano **Kiel akvo de l' rivero** tiu kafejo estas konata en la tuta mondo. Ĉio, kio iom flatas la lokan memestimon, estas avide legata kaj alkurigas ĵurnalistojn kaj fotistojn. Ankaŭ fieris **Les Dernières Nouvelles d'Alsace** pri la vizito de usonaj turistoj kaj pri tio, ke transatlantike Albert Schweitzer ne estas nekonato. Tio estu indiko por nia estonta agado: mi estas certa, ke, se morgaŭ japanaj Esperantistoj venos siavice turismi en Strasburgo, **Les Dernières Nouvelles d'Alsace** tuj publikigos artikolon pri ili, ne grumblante: "Tio ne interesas nin, jam venis usonanoj."

Tute male, mi konsilis al tre sindonema samideano, kiu biciklas tra Eŭropo por diskonigi Esperanton, ke li ne tuj revenu en mian urbon; la unuan fojon, pasintjare, oni intervjuis lin ĉe-televide kaj oni dediĉis al li grandan ĵurnalan titolon **Li biciklas por Esperanto.** Sed mi ja timas, ke la duan fojon li venigus plu nenium. Same, se belulino konsentus senvestiĝi antaŭ la Strasburga katedralo por propagandi nian aferon, mi trovus la ideon taŭga, almenaŭ por la unua fojo: mi nomus la spektaklon **La verda honoro de iu Katarina Blum** kaj la placo ne estus sufiĉe granda, ol ke ĝi akceptus la tuton de la videmuloj. Kiel delegito de UEA pri turismo, mi spertus malfacilaĵojn por trovi sufiĉe da ĉambroj en la hoteloj por la estetikemaj samideanoj. Kaj mi jam imagas en ĉiuj lokaj ĵurnaloj la allogan titolon **Ŝi striptizas por Esperanto.** Eĉ tiakaze, tamen, mi ne konsilus al ŝi refari tion ĉiujare. Tio da aĵoj oni vidas nunne, ke la homoj facile indiferentiĝas, kaj la statuoj de la katedralo eble estus ŝiaj numuraj rigardantoj.



PSSTTT!!... KARAJ LEGANTOJ... BONVOLU PRIATENTI!!... *

A/ EK DE JANUARO 1989 LA ABONO AL "LA INFORMILO" ESTOS JE
42F POR FRANCIO KAJ 54FF POR EKSTERLANDO,
LA FEDERACIA KOTIZO ESTOS JE 22F

B/ LA ADRESO DE NIA LIBRO-SERVO TEKSTAS JENE:

FEDERACIA LIBRO-SERVO,
12, Rue Estienne d'Orves F-54490 PIENNES

JEN KELKAJ NOVAĴOJ AĈETEBLAJ ĈE NIA LIBROSERVO *

= MURDO EN ESPERANTUJO (Daniel MOIRAND) - krimromano	176 p.	63,00F
= VOJAĜOJ FINIĜAS, AMANTOJ KUNIĜAS (Manjo Austin) - romano	130 p.	54,00F
= BELETRO SED NE EL KATEDRO (Waringhien) - literatur-eseo	264 p.	100,00F
= ITALA ANTOLOGIO (Giordanno Azzi)	480 p.	130,00F
= AŬSTRALIA ANTOLOGIO (Alan Towsey)	434 p.	220,00F
= KLAĈEJO (Piĉ) - romano	194 p.	153,00F

Mendu per simpla poŝtkarto (ne forgesu vian adreson!) - Vian fakturon vi malkovros en la pakajo. Tuj post ricevo vi pagu per poŝta ĝiro al "Libro-servo 2800-76 H NANCY" aŭ per bankoĉeko je la nomo de "Libro-servo".

HEJ!... KIOM DA LIBROJ VI AĈETIS ĈI-JARE? NE RUĜIĜU! NE HONTU! ESTAS ANKORAŬ IOM DA TEMPO POR KVIETIGI VIAN KONSCIENCON!

ALVOKO AL ĈIUJ KURSO-GVIDANTOJ *

Ankoraŭ tro raraj inter vi estas tiuj, kiuj uzas la servojn de KSM. Nur dank' al via partopreno pli kaj pli efikos tiu faka helpilo de UEA. Viaj gelernantoj emos je la fino de via kurso kontakti letere alilandanon... Havigu al ili la plej taŭgan adreson! VI UZU LARĜSKALE K°S°M°-n!

La Koresponda Servo Mondskala (KSM) de UEA celas havigi al interesuloj korespondantojn laŭeble konformajn al iliaj deziroj. Ĉiu korespondemulo rajtas senpage enskribiĝi, sed ne ricevos rektan respondon, ĉar KSM disponas pri nenia financa subvencio. Ĉiu persono, kiu deziras rekte ricevi adreson el la komputila adresaro de KSM, devas aldoni du internaciajn respondkuponojn aŭ samvalorajn francajn poŝtmarkojn, aŭ ĝiri unu usonan dolaron al la poŝtkonto de la komisiito pri KSM: Robert Llorens, poŝtkonto *Marseille 7 829-40*. Por aliĝi al KSM skribu al la komisiito viajn

- familian nomon,
- personan nomon,
- precizan adreson,

- sekson;
- ĉu vi estas edz(in)iĝinta,
- kun kiom da personoj vi deziras korespondi,
- el kiuj landoj,
- pri kiaj temoj.

Uzu KSM ankaŭ por plilarĝigi viajn fakajn kontaktojn internaci-skale! Kontribu al la internacia Esperantlingva faka kunlaboro, sendante al KSM vian adreson kaj informojn pri via faka interesiĝo.


Adreso de la KSM-komisiito:

Robert LLORENS
„Les Hortensias 2”
121 bis, *bvd. Napoléon III*
F-06200 Nice, Francio

PARIZA

FRENEZA

SEMAJNO



- **Profitu** nian frenezan semajnon kaj kontrolu la aserton de nia Majstro:
"La Parizanoj estas gajaj homoj" L.L.ZAMENHOF (Piv).
- **Malkovru** la ĉiaman kaj hodiaŭan Parizon!
- **Konstatu, ke daŭre staras** la Eiffel-Turo (1889-1989), la Bastil-Turo, la Operdomoj, la Katedralo Notre-Dame, la Louvre-Palaco, la Obelisko, la Panteono, la Latina Kvartalo, Montmartro,...
- **Miru** pri la uzinaspekta Kulturcentro Pompidou en Beaubourg, pri la Piramido ĉe Louvre Kvadrata Korto, pri la Kolonoj de Buren en la ĝardeno de la Reĝa Palaco, pri la Civito de la Sciencoj kaj ties Geode kun ĝia fama 1000m² ekrano, pri la Orsay Muzeo,...
- Sed ne nur monumentoj kaj muzeoj vidindas en Parizo: la Spektaklo kaj Festeno ĉe "Bateaux-Mouches",... la Popoldancejo (Guinguette) apud la Marne,... vi povos **butikumi ŝike** laŭ Elizeaj Kampoj kaj **popole** tra la pulbazaro de Saint-Ouen,...
- Ankaŭ **frivole** vi spektos la mirindan Revuon de la famkonata **LATINA PARADIZO** Kabaredo!

Solenu la 200^{an} datrevenon de la FRANCA REVOLUCIO!

PREZO: 5500 FF.*

Entenatas

- luksa hotelo por sep noktoj,
- matenmanĝoj kaj ok luksaj manĝoj laŭ franca kulturo,
- sro da vizitoj al muzeoj, luksaj spektakloj, panoramoj, unikaj neofte vizititaj kvartaloj,
- esperantistaj ĉiferonoj,...
- transportoj tra Parizo kaj komuna buso al Flughaveno ROISSY Charles de Gaulle, sabaton 29an matene por trafi la 74an Universalan Kongreson de Esperanto en Britio.

Ne inkluzivas

- kvin foje vi manĝos libere en tipe parizaj kvartaloj.

Malmendoj estos traktitaj laŭ la regularoj de Francaj Turismaj Organizaĵoj, sed ni ne povos garantii la tujan kaj plenan repagon se malmendoj venos post la 22a de junio 89.

★ UNUPERSONA ĈAMBRO: 6400 FF

Aliĝilo

Konstanta adreso:

FRANCE ESPERANTO (Turisma Servo)
4bis rue de la Cerisaie, F 75004 PARIS.

Ĉiu Aliĝanto uzu apartan aliĝilon aŭ fotokopion.
Bonvolu tajpi aŭ skribi preslitere.

NOMO: Sro/Sino/Fino _____

Antaŭnomo: _____

Naskiĝdato: _____

Kompleta Adreso: _____

Lando: _____

Profesio/Fako: _____

LOĜADO Mi deziras unupersonan ĉambron (6400.FF)


Mi tranoktos kun _____

Mi sendas ĉi-tiun aliĝilon al FRANCE ESPERANTO kaj samtempe pagas 2000.FF por la rezervado.

La pluson mi promesas pagi antaŭ la 15a de junio 89

Se vi pagas per banko, aldonu 30FF por bankokostoj.


La aliĝpagon ni kvitanco per kopio de detalita programo.



distra angelo



KRUCVORTENIGMC



HORIZONTALE

1 Kie la ombro indikas la horon. 2 Kiu al ĝi sin frotas, sin pikas! - malgranda birdo(r). 3 Hejtaĵo(r) - scienca vortkomo. 4 Kion oni penas atendi - danĝera gaso(r). 5 Eliri el medio - movi boaton. 6 Nea pronomo(r) - alia pronomo - malgranda feo. 7 Ĝi egalas 90° - prefikso. 8 Aspekto - ŝirmita. 9 Galina birdo(r) - ofte kavigita de rivero(r) - prepozicio. 10 Malpravi(r) - sin ĵeti antaŭen. 11 Portata ujo - disfalta konstruaĵo(r) - sufikso.

VERIKALE

1 Flava rezino - manĝaĵo(r). 2 Speco de bovo - li ne plu laboras - prefikso. 3 Rimarkinda kapablo(r) - unu el la tri juĝistoj ĉe la enirejo de la Inferoj. 4 Ĝi produktas pekanojn(r) - subtera kavo. 5 Miksiĝi kun ia gaso - maŝino por


suprenlevi akvon(r). 6 Disigi - pintarko(r) - greka litero. 7 Provizore doni aŭ preni - unuo de laboro(r) - sufikso - dujara herbo. 8 Mara rabobesto(r) - organo(r) - kvietigi(r) - prepozicio. 9 Ŝanĝi la direkton - malgojiga(r) - sufikso. 10 Atomnumero 79 - odora herbo(r) - sufikso.

SILABENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj" malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

ag ato bo ce ĉa ĉi di ebo ed ef eo ep fo her ic ino iz ĵo ksi kto le mo mor ne ni no no no of ok ok oli op pro raj re ro si so so spe ta ta te to uk vo

1	+ - - +	maniero kuiru laŭ Valano
2	+ - - + -	apartigis de la aliaj
3	+ - - + - - -	respubliko de Sovetunio
4	+ - - + -	mezepoka fermaparato
5	+ - - + - - -	muzikintervalo
6	+ - - + - - -	religia sekto (ano de)
7	+ - - + - - - -	geometria volumeno
8	+ - - + -	adoleskanto en Helenujo
9	+ - - + - - -	pompe celebri
10	+ - - + - - -	venena substanco mikroba
11	+ - - + -	gemo por juvelo
12	+ - - + - - -	aparato por transverŝi likvaĵon
13	+ - - + - - - - -	presita reklamilo
14	+ - - + - - -	longa poemo pri gento aŭ popolo
15	+ - - + - - -	krom tio, aliflanke
16	+ - - + - - -	apoteka laboratorio
17	+ - - + - - - - -	ekceso en la tablaĵ aŭ litaj plezuroj



„Krokodil” (Sovetunio)

"Ne montru al li viajn cirkvitojn, antaŭ ol li edziniĝas al vi!"

Imprimé par les soins de l'ASSOCIATION CULTURELLE DU VERDUNOIS, Pavillon Japiot, Avenue Mangin, 55100 VERDUN -

Le Directeur de la publication: J.-P. COLNOT

Le rédacteur: P. DENIS

Inscription à la CPPAP sous le n° 62887

"Informatique et gestion" (Francio)

